

ISAE-INFORMOJ.

56. **Jarkunveno de ISAE** okazos dum la UK en Munkeno, Germanujo, la 4-11 aŭgusto 1951. Tempo kaj loko aperos en la kongresa programo. Tagordo laŭ la statuto. Komitatanoj kiuj intencas partopreni la kongreson estas petataj sin anonci al la sekretario de ISAE.

57. **Mortis** nia membro profesoro A. Cotton, tre malnova kaj konata esperantisto, iama vicprezidanto de la franca Akademio de sciencoj.

58. **Medicina Revuo**, eldonata en Japanujo, povas esti abonata ĉe la delegitoj de ISAE aŭ ĉe la sekretario kontraŭ unu ISAE-kotizo de aktiva membro.

59. **Studentoj**. Aperis *La Studento*, internacia studenta gazeto, eldonata de Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejoj kaj Studenta Esperanto-Klubo, Kopenhago. Redaktoro estas nia delegito s-ro J. Vesterland-Andersen, Bernstorffsvej 78, HELLERUP, Danujo. La gazeto aperos 6-foje jare kaj la abonprezo estas 1 usona dolaro.

60. **Terminologio**. Dipl. ing. R. Haferkorn, Germanujo (Luitpoldstrasse 5, (13a) REGENSBURG, U.S. Zone), raportas ke li kompilis kartaron E-G kaj G-E de „Elektroteknika Terminaro“, kiu nun baziĝas sur la IEC-vortaro. Speciale li prilaboris la fakon telekomunikado. Ankoraŭ ne ĉiuj terminoj ricevis difinojn. Li proponas ke la terminaraj proponoj estu cirkuligataj laŭ modelo de ISO (Internacia normiga organizo).

D-ro W. J. Nijveld, Nederlando, informas ke li antaŭ kelkaj jaroj ellaboris kemian terminaron nederlanda-esperanta kaj inverse. Ĝi ampleksis ĉ. 4000 terminojn sur kartaro. La materialo nun troviĝas ĉe prof. Waringhien, Francujo, por la ellaborado de nova Plena Vortaro.

Sven Alexandersson.

408.92.004.14 : 3

ESPERANTO EN LA SOCIA SEKTORO ALVOKO.

En la Universala Kongreso de Esperanto en Parizo 1950 en la sekcio Sciencoj kaj Teknikoj, sub prezido de Prof. D-ro Ivo Lapenna, la efektivigo de sistema kontakto inter esperantistoj kiuj laboras en la socia sektoro, — do personoj kiuj estas profesie okupitaj per sociaj aferoj en iu senco, science aŭ aplike, — estis proponata de kelkaj kongresanoj. La sekcio aklame aprobis la esprimitan ideon.

Post la kongreso la prepara laboro por realigi la intencitan kontakton komenciĝis: komisiono formiĝis kiu ellaboris projekton kaj kies unua tasko nun estas alvoki la interesigantojn en la Esperantista mondo por konsideri kaj kune krei bazon por pliaj ejoj.

Ĉiun, kiu deziras kunlabori en la praktikado de la ideo „Esperanto en la socia sektoro“ aŭ estas inklina doni sian helpon alimaniere ekzemple per montrado de nura atento al la temo, ni invitas sendi nomon kaj adreson kun mencio pri profesia funkcio, soci-sciencia, esplora aŭ aplika, al la sekretario de la komisiono.

INTERNACIA KOMISIONO ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO,

D-ro W. Solzbacher, prezidanto; Yonkers N.Y.

C. J. Keur, sekretario, Moerweg 76; Den Haag, Nederlando.

W. A. Gething; Luton, Beds.

Lucien Laurat; Parizo.

Fino J. Scheerlinck; Bruselo.

301.185.14 (048.6)

SOCIOLOGIO DE LA FAMILIO. *)

Problematiko kaj sistematiko.

Resumo pri enkonduka prelego de D-ro P. J. Bouman, Profesoro ĉe la Stata universitato en Groningen, Nederlando, farita en la ĝenerala kunveno de la Nederlanda Sociologia Societo.

Esploro.

La ankoraŭ juna branĉo de la familio-sociologio, al kiu speciale la amerika scienco aldonis valorajn kontribuojn, estas ĝis nun nur malmulte sisteme esplorita.

Kelkaj ĉapitroj, ekzemple la perdo de la funkcioj de la moderna urba familio, forte tiras la atenton. Aliajn ĉapitrojn oni pritraktis nur parte.

Priskribo.

Ankaŭ la sociografia laboro montris neproporcian evoluon kun ofte ne fiksita problemindiko pro kio interalie estis malhelpataj internaciaj studoj sur kompara bazo.

*) Tradukita de C. J. Keur kun permeso de Prof. D-ro Bouman.